**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 34

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** For **k** ␣ **n** ␣ **c** ␣ ␣ **nc** ␣, venos potenco.
**2.** Vivi en **s** ␣ **lk** ␣ kaj veluro, en ĝojo kaj plezuro.
**3.** La ekspansio de Interreto al aliaj regionoj rapide progresos, sed la manko de lingva diverseco ␣ **r** ␣ **ms** ␣ ␣ ĝian utilon.
**4.** Stratoj pavimitaj per betono montras kelkajn ␣ ␣ **nd** ␣ ␣ ␣ aŭ enhavas kelke da interspacoj plenigitaj per gudro.
**5.** La interparolado kun la gastoj de ĉiuj nacioj kaj rangoj ne malhelpis la mastron ␣ **bs** ␣ **rv** ␣ la skribistojn, kiuj notis la menditajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn.
**6.** Dum la 88a UK en Gotenburgo la aĉetantoj verŝis en la ␣ ␣ **s** ␣ ␣ de EU preskaŭ 3 500 eŭrojn kiel aldonvaloran imposton.
**7.** Regula streĉado de la ␣ ␣ **sk** ␣ **l** ␣ ␣ kreas metabolisman ekvilibron, malpliigante la pintojn de glukozo kaj plibonigante la konsumadon kaj solvadon de la grasoj en la sango.
**8.** Sur la spaco de tuta mejlo de la plej ␣ **ks** ␣ **r** ␣ **m** ␣ pinto de la bordo etendiĝis sablorifoj sub la akvo.
**9.** La faruno estas vendata al la bakisto, kiu ␣ ␣ **k** ␣ ␣ la panon, kiun li vendas al konsumanto.
**10.** Esperantistoj ŝatas ␣ ␣ **nf** ␣ **r** ␣ **n** ␣, ke Esperanto havas riĉan kulturon, inkluzive la originalan literaturon kaj mi esperas, ke tiu aserto pravas.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Musavasa faris la saman eraron, kiel la plej alta pastra kolegio: li ne divenis la militan **g** ␣ **n** ␣ ␣ ␣ de Ramzes.
**2.** La teroristoj povas mortigi kelkajn inter ni, sed ili neniam povos mortigi nian spiriton, niajn **id** ␣ ␣ **l** ␣ ␣ ␣ pri libereco de esprimado, nian respekton por la virinoj.
**3.** Laŭ la projekto de la **i** ␣ **ĝ** ␣ **n** ␣ ␣ **r** ␣ ␣ tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj.
**4.** Retemuloj do ricevis mesaĝojn, kiuj ŝajne venis de konataj personoj, enhavantajn tekston, kiu ŝajne estis **d** ␣ **st** ␣ **n** ␣ ␣ ␣ por ili, sed ili tute ne suspektis, ke temas pri viruso-alsendo.
**5.** Giovanni Gallavotti gajnis la premion *Poincaré*, kiu estas la plej grava internacia agnosko pri matematika **f** ␣ **z** ␣ **k** ␣, ĝia valoro estas komparebla al tiu de Nobel-premio.
**6.** La malgranda knabo estis en forta **f** ␣ **br** ␣ kaj malfacile bataladis pro spiro.

**7.** La ĉenhundo en palaco sidas en sunlumo fiere sur sia **b** ␣ **d** ␣ kaj bojas kontraŭ ĉiu pasanto, en pluva vetero ĝi enrampas internen kaj kuŝas seke kaj varme.

**8.** Sed ne timu grandan rapidan **ar** ␣ **n** ␣ ␣ ␣ sur la muro – ĝi povas esti ĉasisto, kaj eble vi vidos ĝin kun noktopapilio en la buŝo.

**9.** En keletaĝo estis knabo, tute eta, li estis vestita per iu **k** ␣ **t** ␣ **l** ␣ kaj tremis, lia spiro flugis el la buŝo kiel blanka vaporo.

**10.** La faktoj estas monotonaj: teroristaj agoj – kontraŭteroristaj operacioj, novaj agoj – novaj respondoj, la tuta politiko koncentriĝas en tiuj **n** ␣ **d** ␣ ␣ de perforto.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

koncert', aŭtoritat', insult', ĵurnal', sovaĝ', kamion', aviad', kanzon', dung', jur'.

**1.** Komence de novembro de l' sama jaro per raketo el ␣**v**␣ ␣ ␣ ␣ **l** ␣ Usono eksplodigis aŭtomobilon en Jemeno, en kiu mortis ses teroristoj de Al-Kaida,

**2.** La kunvenon partoprenis pluraj ␣ **ŭ**␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣ kaj eminentuloj, inter kiuj menciindas la eŭropa komisionano pri esplorado, scienco kaj novigo.

**3.** Aniko unue estis tradukistino, poste ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣ **t** ␣ **n** ␣ kaj dum la lastaj monatoj ŝi tute ne laboris.

**4.** La kursanoj studos en grupoj de Zlatko Tiŝljar kaj de konata ␣ ␣ ␣ **z** ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣ Georgo Handzlik, kiu ankaŭ koncertos por ĉiuj partoprenantoj.

**5.** Makedonaj ␣ ␣ **m** ␣ ␣ ␣ ␣ **s** ␣ ␣ ␣ baris la landlimajn vojojn, tiel ke neniu veturilo el Kosovo povis pasi.

**6.** Malfrue vespere la poeto venis hejmen, li venis el ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ **j** ␣, kie li aŭdis bonegan violoniston kaj estis tute plenigita kaj emociita de lia nekomparebla ludado.

**7.** Kun ĉiu matena eldono de la ĵurnaloj la mondo transformiĝas en ␣ ␣ ␣ ␣ **ĝ** ␣ **j** ␣ ␣, kie embuskas sennombraj surprizoj, danĝeroj kaj epikaj eventoj.

**8.** La registaro decidis altigi impostojn por socia asekuro – anstataŭ antaŭaj 30 % nun ␣ ␣ **n** ␣ ␣ **s** ␣ ␣ ␣ devos pagi 31 %, kaj dungitoj anstataŭ 1 % nun pagos 3 %.

**9.** En la germana demokratio unu sola homo (Merkel) decidas pri aferoj, kiuj grave influas la sorton de la tuta nacio – pluraj ␣ ␣ **r** ␣ ␣ **t** ␣ ␣ opinias, ke Merkel agas kontraŭkonstitucie.

**10.** Li estis konata pro sia kverelemo kaj ␣ ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣ **m** ␣, kiujn kelkaj eŭfemisme nomas polemikemo kaj vervo.

## **Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** La infano terure kriis kaj ___ per la brakoj kaj kruroj; videble ĝi tute ne estis en bona humoro.

**a.** profitis **b.** komisiis **c.** baraktis **d.** ŝutis

**2.** Anstataŭ obei, Jim falis sur la kanapon, apogis la ___ sur siaj manoj kaj ridetis.

**a.** verton **b.** bazon **c.** komplezon **d.** hufo

**3.** La vento blovis la ___ kaj la ŝipo glitis facile kaj sen forta ŝanceliĝado sur la klara maro.

**a.** ezokon **b.** bazaron **c.** avenuojn **d.** velojn

**4.** La lavistino alportis mian tolaĵon: ĉemizojn, ___, manumojn kaj viŝilojn.

**a.** muskolojn **b.** kolumojn **c.** pulmojn **d.** farbojn

**5.** Li, kiu iam komandis la ŝipojn de la Genua ___, kiel almozulo haltas apud la pordego de la monaĥejo kaj petas la pordiston pri kruĉeto da akvo kaj peco da pano por sia infano.

**a.** Respubliko **b.** Envio **c.** Robo **d.** Nadlo

**6.** En la ___ de Homero kaj Heziodo estas dirita eĉ ne unu vorto pri la buŝo, nek pri la kiso en senco de seksa amo, tie estas parolate pri ili nur kiel pri kareso patrina.

**a.** ritmoj **b.** juveloj **c.** poemoj **d.** bareloj

**7.** Oni bezonos longan ___ sub la pantalono, kelkfoje eĉ duan, lanan aŭ sintezan paron kaj la plej ekstera pantalono estu ventrezista.

**a.** imposton **b.** kalsonon **c.** animalon **d.** juron

**8.** La antikvaj Egiptanoj konstruis potencajn digojn kaj fosis akvujojn, el kiuj la arta lago Moeris okupis 300 ___ kvadratajn kaj estis profunda dek du etaĝojn.

**a.** motorojn **b.** veŝtojn **c.** anĝelojn **d.** kilometrojn

**9.** La kandidato deklaru sian akcepton de la kandidateco, sian fidelecon al la ___ de Esperanto kaj sian pretecon por la laboroj de la Akademio.

**a.** Fundamento **b.** Amplekso **c.** Ŝvito **d.** Vidvo

**10.** Iam iu koliziis kontraŭ mia parkumita aŭto kaj forfuĝis, sed mia turka najbaro rapidis al mia ___ kun la notita numerplato kaj por mencii, ke li pretas atesti.

**a.** anaso **b.** almozo **c.** afiŝo **d.** apartamento